

Heinrich Heine,  
En dolĉega Maj’

*tradukita de Friedrich Pillath*

Printempe en dolĉega Maj’,  
Dum la burĝonoj krevis,  
El mia koro ĝerme  
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega Maj’,  
Dum birda kanto sonis,  
De l’ kora mi sopiro  
Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).*

*Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)*

*Tiu ĉi traduko aperis en Elekti-  
taj Poemoj, Berlin: Esperanto-Verlag  
Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920,  
p. 13. La origina germana-lingva  
versio troviĝas en la „Libro de la  
kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“  
(1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pil-  
lath vidu ankaŭ la vikipedian re-  
tejon [http://eo.wikipedia.org/  
wiki/Friedrich\\_Pillath](http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath).*

Heinrich Heine,  
En la mirinda bela  
Maj’

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

En la mirinda bela Maj’,  
dum sin burĝonoj fendis,  
en mia kor’ la amon  
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj’,  
dum birda tril’ ne ĉesis,  
al ŝi sopiron mian  
konfide mi konfesis.

*Traduko de la Germana poemo  
“Im Mai” de HEINRICH HEI-  
NE (\*1797-12-13 – †1856-02-  
17) en Esperanton de KÁLMÁN  
KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo,  
\*1911 – †1976).*

*Arg-203-1082 (2010-05-26  
12:08:05)*

Heinrich Heine,  
En Majo

*tradukita de Manfredo Ra-  
tislavo*

En Majo, kiam ĉiuj  
Burĝonoj malfermiĝis,  
La amo kiel floro  
En mia kor’ estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj  
Birdetoj sin aŭdigis,  
Al ŝi deziron mian  
Sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Germana poemo  
“Im Mai” de HEINRICH HEINE  
(\*1797-12-13 – †1856-02-17)  
en Esperanton de MANFREDO  
RATISLAVO (Manfred Retzlaff,  
Stettiner Str. 16, D-59302  
Oelde, Germanio, \*1938-11-  
04) en 1982-11-14.*

*MR-002-4 / Arg-203-403  
(2004-04-05 20:37:00)*

*La poemo troviĝas en la „Li-  
bro de la kantoj“, sekcio „Liri-  
ka intermezo“ (1822 - 1823),  
n-ro I.*